



La Kandelumo Verda

- Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo -

Vetero: tage +34, parte sunbrilo

KONGRESA KURIERO DE LA 102-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

N-RO 5 | 2017 07 27, ĵaŭdo

OKAZIS

Pri Ekskurso E1 al la limo

Ekde la fino de la Korea Milito en la jaro 1953 la limo estas en la manoj de Unuiĝintaj Nacioj. UN kreis zonon ĉirkaŭ la limo el 2 km en la nordo kaj 2 km en la sudo, do entute 4 km larĝan bandon inter la Flava Maro en okcidento kaj la Orienta Maro (Japana Maro); kun longeco proks. 280 km.

Pro tio ne eblas skribi, kiel aperis en la kongresa kuriero numero 1, ke la postuloj pri aspekto de la vizitontoj venas de la "Korea Senarmeigita Zono". La senarmila zono en la manoj de UN estas vartita de NNSC (*Neutral Nations Supervisory Commission*) observa komisiono de neŭtralaj nacioj.

Ekde 1953 tiu komisiono grupigas taĉmentojn el Pollando, Ĉeĥoslovakio, Svislando kaj Svedio. Nuntempe deĵoras tie Svedio kaj Svislando kun po 5 soldatoj. Tiu komisiono kunlaboras ankaŭ kun sud-korea kaj usona armeoj. Pli da detaloj troviĝas en la blogo (mirejo.blogspot.com) esplorante pri PAMNUNJOM.

<http://mirejo.blogspot.kr/2008/09/panmunjom.html>

La organizantoj de la ekskursoj sukcesis rilati kun turisma agentejo en Seulo kaj usona bazo en Panmunjom.

Mireille Grosjean, KN 218



Kristanaj aranĝoj dum la UK

Dum la 102-a UK dimanĉon laŭ tradicio okazis la Eku-mena diservo en la katolika preĝejo Imun-dong proksime al la kongresejo. Ĝin gvidis pastoro el Svedio Leif Nordenstorm kaj ĉeestis kvindek da kongresanoj, inter kiuj estis multaj novaj vizaĝoj. Oni preĝis i.a. por la kongresanoj kaj ĉiuj kristanaj esperantistoj. Sekvis la meso en Esperanto, kiu la unuan fojon okazis en Koreio. La celebranto estis sacerdoto Bonifacio Gim Chungsu, kiu, kvankam mem ne esperantisto,

renkontiĝis kun Esperanto dum sia studado. La meson ĉeestis trideko da kongresanoj, inter kiuj estis multaj koreaj esperantistaj katolikoj. Jen bela espero por IKUE. Ankaŭ la meson ĉeestis la ĵurnalistino de la katolika gazeto, kiu intervjuis la vicprezidanton de IKUE Marija Beloŝeĉiĉ.

Marde okazis la komuna kunsido de IKUE kaj KELI. M. Beloŝeĉiĉ kaj L. Nordenstorm prezentis la historiojn kaj agadojn de ambaŭ asocioj. Aparte oni atentigis pri la ekumena agado kaj anoncis la venontjaran Ekumenan Esperanto-Kongreson, kiu okazos de la 6a ĝis la 13a de aŭgusto en Podebrady, Ĉeĥio.

Marija Beloŝeĉiĉ, KN 121

E-karavano tra Rusio al Seulo

De la 4a ĝis la 22a de julio tra Rusio trajnumis 38 personoj el Belgio, Bulgario, Germanio, Francio, Rusio, Svislando kaj Usono. La rusiaj geesperantistoj varme akceptis siajn gastojn en Sankt-Peterburgo, Moskvo kaj Vladivostoko. La neku-time malvarma kaj ofte pluva somera vetero ne malhelpis al gekaravananoj konatiĝi kun certaj vidindaĵoj de la vizititaj urboj, ĝui varian kulturen programon.

La ŝipumado sur la Bajkal-lago, baniĝo en varmaj fontoj de siberia regiono, gustumo de burjata kuirarto kaj multo alia restos por longe en memoro de vojaĝintoj, same kiel trajnumado mem en komfortaj vagonaj kupeoj en E-samideana rondo. Seulon ili atingis per rekta flugo el Vladivostoko. Rememorojn pri la pasinta E-karavano iom pli poste vi povos legi en <http://www.esperanto-karavano.info>

Tatjana Loskutova, KN 156



Junulara programo: Monstro

Lundon 24-an/07/2017 je 16h00 kadre de la Junulara Programo estis projekciita la filmo *Monstro* (2016, korea titolo: 괴물, *Gwoemul*, usona titolo: *The Host*).

La filmon realigis la fama korea reĝisoro *Bong Joon-ho*, kies plej lasta filmo *Okja* estis montrita en la Festivalo de Cannes 2017 kaj alia konata filmo estas *Snowpiercer* (2013).

Kvankam mi jam spektis ĝin kineje, mi plezure revidis ĝin, ĉi-foje kun Esperantaj subtekstoj pretigitaj de la Korea Esperanto Junularo, kun kelkaj misoj, sed ĝenerale bonaj, ebligantaj sekvi la tutan rakonton.

La filmo estas laŭ mi bonega: ĝi estas kaj monstrofilmo amuza, timiga, suspensplena, kaj familia dramo kortuŝa. Mia noto: 4/5.

Dudeko da homoj ĉeestis ĝis la fino, je 18-a kaj iom, kaj tiam hastis al la komuna fotado.

Koree,

Aleks Kadar, KN 640

ATEO

La kunsido de ATEO okazis dimanĉe la 23an de julio je 17h15 en la salono *Selten*, sub gvido de *Dieter Rooke*. Partoprenis dudeko da homoj; duono membroj de la asocio, duono ne. La ĝenerala temo estis "Ateismo en Azio". Prelegis D-ro *Giridhar Rao* pri la aktuala situacio de ateismo en Barato, kie iuj ekstremistoj instigas al ne-toleremo kontraŭ alireligiuloj kaj ateistoj. Sed nuntempe ankaŭ hinduoj protestas - "Ne nianome!" - kontraŭ ne-toleremo, tiel ke la ateistoj ne restas izolitaj en sia protesto.

Estis tre interesaj demandoj kaj komentoj de japanaj kaj alidevenaj partoprenantoj pri la difino de ateismo, pri la statuso de religioj kaj pri ilia rolo en diversaj etapoj de la vivo. Kiel komentis poldevena partoprenantino nun vivanta en Japanio: "En Japanio ne esti ano de religio estas ordinara afero; en Pollando esti katolika estas ordinara afero, kaj ateismo estas protesto."

Claude Nourmont, KN 596

La filmo "Plena Rondo"

La filmo 'Plena Rondo' farita de *Anti-cool*, japana artistino estis prezentita marde (pri la enhavo, bv. legi la paĝon 74 de la Kongresa Libro).

Ĉirkaŭ 60 homoj kolektiĝis. Ĝi iniciatas per sia Tutmonda Filmoprezenta Tago, la 21a de oktobro, diskuton pri la signifo de lingvo, ĝiaj lokoj kaj povo en nia tutmondiĝinta socio.

Ni alvokas vian partoprenon. Kunlaborantoj por fari subtitolojn en diversaj lingvoj estas serĉataj! Interesiĝantoj turnu sin al la retejo: <http://www.plenarondo.com>

Kitagawa Ikuko, KN 165

Aŭkcio atendas vin!

Vendrede, en la salono *Hodler* ekde 16h30 ĝis 18h00 vi povas ne nur ĝui la gvidadon de prof. *Humphrey Tonkin*, sed eble ankaŭ ekhavi la urbakceptan karton kun originala subskribo de *Fidel Castro* el 1990, aŭ lernilojn, poŝtkartojn pli ol 100-jarajn - kaj ni eĉ ne parolis pri la arĝenta tekulero kun bildo de *Zamenhof*. Ni haltu nun en la listigo, ĉar pli ol 40 aŭkciaĵoj atendas vin vendrede. Memoru, ke via mono servos bonan celon: ĝi subtenos la Volontulan Servon, ebligante ke homoj povu volontuli en la Centra Oficejo el la tuta mondo.

Venu por ĝui kaj subteni!

Veronika Poór, KN 61

Aŭtoraj Duonhoroj

Dum la hodiaŭaj Aŭtoraj Duonhoroj vi havos la ŝancon renkontiĝi kun *Marija Belošević* kaj *KIM Uson*. Ambaŭ duonhoroj okazos en la salono *Šturová* (ĉambro 302, 3-a etaĝo). Se vi interesiĝas kontribui al la Aŭtoraj Duonhoroj okazontaj ĝis la fino de la kongreso, liberu la morgaŭa posttagmeza duonhoro (15h00-15h30).

Sara Spanò <mariarosaria.spano@gmail.com>, KN 53

Bonvenon al Ŭonbulismo

Tiuj, kiuj aliĝis al la evento "Bonvenon al Ŭonbulismo", venu ĝis **12h40** post la fermo de la kongreso, **al la stadiono** ĉe la ĉefa konstruaĵo de la kongreso. Tie vin atendas tri busoj, kiuj ekveturigas je **13h00** al la renkontiĝejo. Konsilindas ke vi jam kunportu viajn valizojn el via hotelo, venante ĉeesti la kongresan fermon. La kotizon pagu en la buso per eŭroj aŭ ŭonoj. Bonvenon!

JUNG Hea-young (Sveka), KN 1061



* Komuna memorfoto de la 102-a Universala Kongreso

* Memorfoto (35cm x 15cm; nur 100 ekzempleroj)

Kiel atingi la Civitanan Halon por la urbestra akcepto

La urbestra akcepto (14h30-15h30) okazos ne en la kongresejo, sed en la **Taepyeong Halo de la Civitana Halo** (Domo). La loko facile atingeblas per metroo. La veturo daŭras ĉirkaŭ horon ekde la kongresejo.

1) Prenu metroon direkte al la Seula stacidomo kaj elmetroiĝu en la haltejo **City Hall** (시청역) kaj iru al la **elirejo n-ro 4** (서울특별시청 시민청).

2) Malfermu la pordegon al la Civitana Halo (*Seoul Citizens Hall*) kaj dekstren iru ĝis la verda kolono, malantaŭ kiu estas lifto. Malsupreniĝu, kaj vi trovos vian cellokon en la subtera dua etaĝo.

Aŭ kolektiĝu je 13h30 ĉe la informejo kaj vin kondukos koreaj esperantistoj ĝis la celloko.

LKK

Manifestacio kaj futbalmatĉo

Surstrata manifestacio por diskonigi Esperanton al la loka publiko okazos ekde 16h30 de la kongresejo ĝis la liceo *Kyunghee*, kie okazos la tria Pokalo *Zamenhof*. Tuj poste, je 17h00 la Esperanta teamo ludos kontraŭ la loka teamo *Dongdaemun-gu*. Partoprenu en la manifestacio kaj spektu kaj subtenu la Esperanto-teamon.

Scienca Kafejo

Selten 11h00-13h30. La Kafejo konsistas el kvin popularaj prelegoj. Ĉiu prelego estas duonhora pri tre diversaj temoj: kiel Antagonismo vojsignoj - internacia lingvo?; korea ginsengo ktp.

Amri Wandel, KN 641

Pontkunveno por la Unuiĝo de Koreio

1. Pontkunveno en la Kongresejo

* Kiam: julio 27 (ĵaŭ.), 16h00-18h00

* Kie: salono **Elpin**, #106 (Sociscienca Domo)

2. Pontkunveno en la Korea Parlamentejo

* Kiam kaj kie: julio 28 (ven.) en la 2a konferencejo de la Parlamentana Domego

12h00 Ekiri de la Kongresejo (buse 45 minutojn ĝis la Parlamentejo)

Amasiĝu 10 minutojn antaŭ la ekiro antaŭ la ĉefa konstruaĵo de la kongresejo.

12h45-14h00 Promeni, foti kaj tagmanĝi en la Parlamentejo

14h00-17h00 Partopreni en la Pontkunveno por la Unuiĝo de Koreio

18h00 Alveni al la kongresejo

* Demando: d-ro *SO Gilsu* (Tel: +82 10 8869 9930)

* Bv. sin anonci tiuj, kiuj jam antaŭ la UK rezervis sian lokon por la Pontkunveno. La limdato estas 14h00 en la 27a de julio. Ni devas transdoni al la Parlamento la lastan liston por enirpermeso.

102-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

2017.07.27
20h00-21h00
(ZAMENHOF)



ongreso de Esperanto en Seŭlo (foto: SO Jinsu de FFT)

roj) aĉetebblas kontraŭ 4000 ŝonoj ĉe la koncerna ĝiketo en la unua etaĝo de la kongresejo.


Korea Antologio de Noveloj

Ĉi tiu Antologio atingis la duan eldonon, tre ampleksigitan per multaj valoraj tekstoj kompare kun la jam interesa eldono de 1999.

Estis granda honoro ne nur provlegi la tekstojn, sed ankaŭ plurfoje renkonti 'malgraŭ malforta sano' s-ron *CHO Sung Ho* kaj la novan ĉefredaktoron, s-inon *KIM Uson*, kiu ankaŭ cetere min helpadis. Jam en la ILEI-kongreso eblis prezenti ion el la Korea literaturo, sed se menciis nur unu tekston el la nova antologio, la aktuala proceso pri ole-poluo de insulo el apuda rafinejo kun ĉiuj peripetioj (fulmrapidaj situaciŝanĝoj), inkl. malkovron de grandskala koruptado, efikas hororfille.

Mi povas nur varme rekomendi ĉi tiun brilan eldonon de Korea Esperanto-Asocio, kies prezo por preskaŭ 550-paĝa bele bindita libro estas vere modesta.

Robert Moerbeek, KN 42.



Renkontiĝo post 31 jaroj:

Mia unua UK estis en Pekino en 1986. Tiam mi estis 15-jara kaj partoprenis kun mia patrino. Estis mia unua sperto pri Esperanto en fremda lando. En tiu vojaĝo mi faris novajn geamikojn, inter ili mi konatiĝis kun Patrino kaj filino (10-jara) el Germanujo kaj ankaŭ kun Japana Patrino kaj filo. Post la paso de la jaroj tiu Japana Patrino fariĝis mia patrino fratino kaj ili fariĝis samĉambraninoj dum Esperantaj vojaĝoj. Ŝia nomo estas *Masami Suzuki*, bedaŭrinde ŝi jam forpasis, sed antaŭ ol veni al la Seula UK, ni vizitis Japanion kaj ni havis la bonŝancon denove renkontiĝi kun *Phoebe* el Germanujo kaj *Norio* (filo de *Masami*). Post 31 jaroj nia amikeco longe daŭras. Nun mia filo estas 15 kaj li kun mia filino (12) partoprenas en la IIK. Ĉu la historio ripetas kaj miaj gefiloj renkontos siajn novajn geamikojn post 31 jaroj en la jaro 2,048 kaj li skribos similan artikolon? Same kiel mi nun? La semoj, kiujn plantis miaj geavoj ankoraŭ estas vivaj kaj la fruktoj videblas kaj sentas en la Esperanta amikeco dank' al nia amata kaj kara lingvo.

Joaquin Rosillo Vega Acosta, KN 126

Scivolemulo sekvis

Deko da kongresanoj kunveturis de la flughaveno al la kongresejo. Ni havis Esperanto-flagon kaj interbabiladis. Unu scivolemulo alparolis nin kaj ni klarigis pri la lingvo. Li jam lernas Esperanton ĉe *Duolingo*. Mi denove certigas, kiom gravas kolektiva moviĝo kun Esperanto-interparolo. <https://www.facebook.com/luuuke.hutch/posts/10154672316721720>

Jurgita Narbutienė, KN 678

El la redakcio

La redakcio de la kongresa kuriero sub la titolo "*La Kandellumo Vera*" kolektas viajn kontribuojn per retadreso: **chojus@gmail.com; chtaesok@hanmail.net** aŭ pere de organizantoj ĉe la informejo aŭ persone. Via kontribuaĵo estu transdonita al la redakcio plej malfrue **je la 18a horo de la kuranta tago**. Anticipan dankon pro via kunlaboro.

CHOE Taesok, redaktoro

Hodiaŭa ĉefmanĝaĵo en la universitata manĝejo

Matenmanĝo 08h00-10h00	Tagmanĝo 1 11h00-14h30	Tagmanĝo 2 11h00-14h30	Tagmanĝo 3 11h00-14h30	Vespermanĝo 16h40-18h40
Denĝancige 된장찌게 1500krw	Ĉolpan bokumbap 철판 볶음밥 2500krw	Galbitang 갈비탕 2000krw	Colmjjon 쫄면 1500krw	Sangĉu bulgogi bibimbap 상추 불고기 비빔밥 2000krw
Rizo, sojpasto supo en varma ujo	Fritita rizo sur pato	Rizo kun bovoripa supo	Firma malvarma nudelo	Rizo kun laktuko kaj porkaĵo